# SUDFRANCA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio « Languedoc-Roussillon »

*5, Quai Vauban* - 66-**PERPIGNAN** (P.-O.) - *Telefono 34-38-84*

Jara Abono : 3 F. – C. C. P. 956-28 Montpellier

N° 33 --------- Jara Abono : 3 F. ----- 4 a Trimonato 1969. --------

## RAPORTO PRI LA ESPERANTISTA RENKONTIGO EN VERGEZE.

La dimanĉon, 26-an de oktobro, okazis en la Junuldomo de Vergèze (30) esperantista renkontiĝo sub la aùspicioj de la Federacio "Languedoc-Roussillon".

40 samideanoj el Alès, Béziers, Le Cailar, Montpellier, Nimes, Perpignan kaj Romans ĉeestis tiun amikan renkonton. S-ro CESARANO, direktoro de la Junuldomo, akceptis ilin kun granda afableco kaj la urbestro de Vergèze, kiu ne povis partopreni la kongreseton, transdonis leteron en kiu li esprimis sian simpation por la movado; li delegis unu el siaj konsilantoj por reprezenti la magistraton.

Matene, ekspozicio pri esperantaj libroj, gazetoj, korespondadoj estis organizita intence de la Vergeza publiko. Kaj poste, F-ino TER RAL, prezentis esperanto-parolatajn filmojn pri Egiptujo kaj Ĉekoslovakujo kiujn ŝi-mem verkis.

Je 12h30 la ĉeestantaro ĝuis bongustan manĝaĵon ĉe la kantino de la duagrada lernejo. Kaj, posttagmeze, S-ro LENTAIGNE projekciis diapozitivojn pri esperanto por la neesperantista publiko. POsttagmeze ankaù la Federacio Komitato kunvenis. Ĝi elektis aliajn novajn komitatanojn : F-ino VIERNE, vic-Prezidentino, S-ro Maurice DELIGNE, vic-[Sek]retario, F-ino BONNY vic-Kasistino, S-ro FRUS, delegito pri la bulteno " Sud-Franca Stelo ".

La suno kaj la bonhumoro regis la tutan tagon, tiel ke la etoso de tiu esperanta kunveno estis vere taùga. La proksima federacia komitata kunveno okazos en Narbonne, ĉe la Junuldomo, la dimanĉon 25-an de januaro je 9h45. La Federacia Kongreso okazos en Perpignan, ĉe la Metia Cambro la dimanĉon, 26-an de aprilo. La Hispana-Franca Renkontiĝo okazos en Jaca ( Hispanujo ) la dimanĉon 28-an de Junio.

R.L.W.

--oo-oo--

## RAPORTO PRI LA KOMITATA KUNVENO DE LA FEDERACIO EN VERGEZE.

Dum la renkontiĝo de Vergeze, la dimanĉon 26-an de Oktobro, la Estraro de la Federacio " Languedoc-Roussillon" kunvenis por diskuti pri diversaj temoj, je 15 h 30, en aparta ĉambro de la junuldomo.

Ĉeestis la kunvenon : S-ro ANGEVIN, F-ino BONNY, S-roj JEANNEZ, LLECH-WALTER, RAYNAUD, F-ino VERRY, S-ro VIGNE, F-ino VIERNE, Ge-roj VOLPELLIERE. S-ro CATIL, el Romans, kaj juna lernantino, el Vergèze, partoprenis ankaù la kunvenon kiel " observantoj."

La komitatanoj elektis sian estraron kies liston vi povos legi ĉi- sube :

| | | |
|---|---|---|
| Prezidanto | : | S-ro R. LLECH-WALTER |
| Vic-Prezidantino | : | F-ino Y. VIERNE |
| Sekretarino | : | F-ino M. VERRY |
| Vic-Sekretario | : | S-ro M. DELIGNE |
| Kasisto | : | S-ro L. ANGEVIN |
| Vic-Kasistino | : | F-ino BONNY |
| Delegito pri la bulteno | : | S-ro FRUS |

kaj decidis :

- noni dek unu federaciajn komitatanojn : 4 el Gard, 3 el Herault, 2 el Aude, 2 el Pyrénées-Orientales. La elekto okazos dum la proksima Federacia Kongreso.

- plialtiĝi la prezon de " Sudfranca Stelo " kiu kostos de nun 3 F.
- revizii la statutojn por modernigi ilin. Kiam ili estos pretaj, oni sendos ekzempleron al ĉiuj komitatanoj kaj ĉiuj federacianoj kiuj deziros ricevi ilin.

- propagandi en la gazetaron, inviti eksterlandan preleganton, oferdoni 10 tagan restadon en la kastelo " Gresillon " al iu merita lernanto aŭ lernantino por ke la movado en "languedoc-Roussillon" kresku.

Ili decidis ankaŭ renkontiĝi la dimanĉon 25-an de januaro 1970 en Narbonne, por daŭrigi la laboron kaj bone administri la societon.

M.V.

" Oni rezervu sian tagmanĝon ( 15 F.) al S-ro DELIGNE
3 C Rue Paul Ramadier. 11 NARBONNE.

-oo - oo-

Ek de nun pensu, pri viaj
KOTIZOJ kaj ABONOJ 1970

| | | | |
|---|---|---|---|
| U.F.E. | membre adhérent | 6 F. | |
| | titulaire | 30 F. | ) reçoivent la revue |
| | titulaire jeune | 15 F. | ) " Franca Esperantiste " |

Abonnement à Sudfranca Stelo : 3 F.

| | | |
|---|---|---|
| U.E.A. | M.J. membro kun jarlibro .................... | 23 F. |
| | M.A. membro kun abono al Esperanto ........... | 46 F. |
| | J.M.J. junulo kun jarlibro .................. | 11,F.50 |
| | J.M.A. junulo kun Esperanto ................. | 34nF.50 |

Simpla abono al Esperanto 34,50 F.

LA PRAKTIKO 18,50 F.

Pagu al Fed. Esp. Languedoc-Roussillon ) C.C.P. 956- 28
ĉe ANGEVIN Lucien 30 LE CAILAR ) Montpellier.

# VIVO DE LA GRUPOJ

## ALES

### NIA NOVA SIDEJO

La 4 an de septembro, okazis la inaùguro de la Urba Biblioteko kaj Kultura Centro, lokitaj en la tute renovigita eks Minlernejo 2 Place Henri BARBUSSE.

Same kiel la aliaj kultur-societoj, nia esp.grupo havas lokon en tiu multfaka ejo kaj disponas ĉiu-vendrede pri bele meblita komuna kurso-ĉambro - en kiu daùre vidiĝas propagand afiŝoj - kaj ankaù pri libro ŝranko, saloneto por grup kunvenoj kaj leterkesto.

Okaze de la inaùguro ni prezentis ekspozicion, kiun vizitis la urbaj instancoj kaj ties invititoj.

En tiu multe frekventata loko nia propagando estos certe pli facila kaj, ni volas esperi, pli efika.

-oo - oo-

## NIMES

### RECENZO pri AKTIVECO DE "CERCLE CULTUREL ESPERANTISTE NIMOIS"

La gegrupanoj kunvenis la 15 an de oktobro en la sidejo (Biblioteko Séguier) por starigi la programon de sia venonta aktiveco. Bedaùrinde, kelkaj membroj ne povis ĉeesti tiun gravan diskutadon. Tamen, ni havis la ĝojon akcepti du novajn kamaradojn kiuj studas en Teknika Liceo de nia urbo : S-ro TARRASA (Perpignan) kaj ANDRIAMIAZA (Madagascar).

Ge-Sinjoroj VOLPELIERE raportis pri sia maldaùra restado en la Kastelo Gresillon kie ĉiu grupo devis klopodi por sendi, ĉiujare, junan lernant(in)on. Oni gratulas S-ron FRUS kiu ĵus havis knabineton. S-ro ANGEVIN parolas pri la regiona renkonto kiu okazos, je la 26-an de oktobro, en la urbeto VERGEZE.

. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

Pri tiu Vergeza-Kunveno, " Sudfranca Stelo" recenzas aliloke. Nia grupo havis 5 partoprenintojn ( Ge-Volpeliere, S-roj Puechagut, Jannez, S-ino Avesque). Du artikoloj aperis en la gazeto " Midi Libre " pri tiu renkonto. Multaj instrui stoj praktikas la "modernajn metodojn" en siaj lernejoj, kiel faras S-ro CESARANO. S-ro LENTAIGNE zorgas sindoneme pri tiu afero. Estas dezireble ke niaj grupoj helpu tiun provon de modernigata pedagogio, zorgante la korespondadon inter franca kaj alilandaj lernantoj, kaj la interŝanĝon de infangazetoj, desegnoj, dokumentado. Iom post iom, la koncernataj instruistoj interesiĝos pri nia lingvo malgraù ilia kvazaùa indiferenco.

La Sekretario de la Grupo,
H. JANNEZ.

-oo-oo-

### FAMILIA VIVO

Ni ĝojas sciigi al vi la naskiĝon de knabineto Sandra dua infano de niaj geamikoj Roberto kaj Sylvette FRUS el NIMES.

NARBONNE

La grupo kunvenas regule ĉiujn monatojn; krom tio, la plej aktivaj membroj ofte renkontiĝas por diskuti kaj agi.

La lasta kunveno decidis organizi publikan prelegon en la Junul Domo la 22 an de Novembro, 21 an horo, D-ro ALBAULT estis petita pri tio kaj li konsentis.

La Deputito Urbestro de Narbonne estas invitita por honorprezi di la kunvenon. Grava laboro estas farita por atingi la maksimuman su sikceson. Pro la eminenteco de la preleganto kaj de la prezidanto, tiu manifestacio devas doni bonajn rezultojn. La samideanoj de la regiono estas invititaj ĉeesti se estas eble.

La celo de la manifestacio estas veki intereson pri Esperanto kaj praktike instigi lernantojn por la malfermotaj kursoj.

-oo-oo-

MONTPELLIER

Ni provis novan kunvenejon sed ĝi ne taŭgas, pro tio la novembra kunveno ne okazis.

La venonta kunveno okazos lundon 1-an de decembro en la kutima loko 34, strato Université.

-oo-oo-

HALTADA DISKO

Kaptu la okazon de la finjaraj festoj por oferdoni al viaj amikoj diskon de haltado.

Tiu disko - aprobita de la Polica Prefekto sub la N° 284- entenas la mencion ( franclingve por la propagando ) : ESPERANTO V...DUA LINGVO.

Oni povas aĉeti ĝin ĝirante 3,oo F (poŝta elspezo inkluzive) al la C.C.P. 1.343-58 Montpellier. en la nomo de " Centre Culturel Esperantiste" 5 Quai Vauban 66 Perpignan.

o8o

ATENTU! ATENTU!!

La pedagogia novado FREINET ĵus reeldonis la broŝuron B.T. N° 437, " L'ESPERANTO" kies aŭtoro estas LENTAIGNE.
Gi estas esence destinita al infanoj, sed ankaŭ taŭgas por plenkreskuloj. Nepre donacu ĝin al viaj junaj amikoj, al instruistoj por ilia klaso, ktp.

Vi povas mendi ĝin rekte al LENTAIGNE 3 Av. de la Gaillarde, Montpellier C.C.P. 466.99 Montpellier, aŭ per poŝtmarkoj.

Kosto : 2fr½ ; 10 kostas 20 F.

o8o

En la Junuldomo de VERGEZE " LA CAPITELLE" nova kurso malfermiĝis

-oo-oo-

Roneotypé par la Fédération d'Esperanto Languedoc-Roussillon
Directeur de la Publication : Lucien ANGEVIN. 30 LE CAILAR.